


# katolika sento

'74

anno 53°
u.e.c.i.

rm

## KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 53° - 1974**


Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

**KATOLIKA SENTO**

**n;oj 7-8**

**53a Jaro** Julio-Aŭgusto 1974

PRI LA UNIVERSALA KONGRESO de Hamburgo niaj legantoj ricevos certe el la revuo "Esperanto" kaj el aliaj periodaĵoj multe pli da informoj, ol tiuj, kiujn ni mem povus doni. Pri la komuna kongreso IKUE-KELI, samo kaze celebrita, oni atendas raporton el Espero Katolika ĉar ni ne ricevis ankoraŭ aliajn detalajn informojn, krom la antaŭviditan programon.

Nur ni povas diri, ke oni decidis komunajn kongresojn je ĉiu kvara jaro, kaj la apartan IKUE-kongreson je ĉiu dua jaro.

Fakte, post la ŝaŭmo de la unuaj klopodoj, la renkontiĝoj baldaŭ sedimentiĝ kaj klariĝis, montrante, kiom pli facile estas jam nun interparoli kaj eĉ eltiri reciproke fervoron de kristana vivo.

Sed jen, gravan anoncon ni povas anticipi al niaj legantoj, kvankam ni mem deziras pri tio havi pli precizajn informojn kaj akordiĝojn:

La IKUE-kongreso de la Jubilea Jaro 1975, laŭ la proponoj ĵus prezentitaj al ni, okazos en Romo, fine de la venonta aŭgusto!

La projekto estas tre alloga, se almenaŭ ni ne konsideras la sumon de la laboro, kiun ĝi postulos. Cetere ni esperas, ke el nia Roma Grupo ni ricevos por la eksterordinara ŝanco, ĉiun eblan helpon.

Oni povus timi, ke la kutime distroriĉaj programoj de kongreso forprenos iom el la enmemiĝo necesa por la akiro de la eksterordinara jubilea indulgenco; sed pri tio certe atente zorgos la organizontoj de ĉi tiu evento, pli unika ol escepta!

Senprokraste, do, ĉiu jam planu sian partoprenon!

EL ARGENTINO NI RICEVIS INFORMOJN pri renovigo de la estraro de nia frata "Asociacion Esperantista Catolica Argentina". Laŭ ĉi tiuj informoj d.ro J.A. Quiña Gonzalez, fondinto de AEKA, eksiĝinte de sia multjara ofico, estis nomita Honora Prezidanto. Kaj nova prezidanto estas: Prof. Manuel Schiavoni; Vic-prez.: Matil de Laurenza; Sekr.: Stella Maris Manochi De Schiavoni; Vic-sekr.: Nelly Balatti; Kasist.: Pilar Garcia; Membroj: Maximo Valentinuzzi kaj Teresa Bignami. Al la tuta AEKA kaj aparte al ĝia nova estraro niaj plej koraj bondeziroj.

LA 7-an DE MAJO FORPASIS 89-jara Giovanni Tanzi, unu el la plej laboremaj kaj humilaj pioniroj de Esperanto en Italio. Funkciulo de la Itala Esperanto-Federacio jam en la antaŭmilitaj jaroj, persista reorganizanto de ĝi post la milito, li verkis precizan historieton de la Esperanta vivo en Milano, en kies klubo li laboris pacience dum sia tuta vivo. Ĉe la funebra ceremonio kunvenis multaj esperantistoj, inter kiuj junaj reprezentantoj kun la Esperanta flago, kvazaŭ ekstera signo de omaĝo kaj samtempe akcepto de heredaĵo engaĝiga al plua batalado por la Internacia Lingvo. La lastan saluton donis samideano Angelo Lovati, kiu esprimis per kortuŝaj vortoj la ĉagrenon de la amikoj.

Pro la daŭre kreskintaj kostoj, ni devas iomete altigi la jarkotizon por 1975 al :

it.lir. 2.000

Konsiderante, ke malgraŭ ĉi tiu altiĝo, Katolika Sento kostas ankoraŭ malpli ol ĉiu alia bulteno, ni esperas, ke multaj volos aboni nian revuon. Sacerdotoj kaj aliaj personoj, kiuj interkonsentis kun ni, povos, anstataŭ pagi abonon, oferi du mesojn laŭ intenco de p.Jacobitti.

La novaj abonantoj ricevos, krom la jarkolekton de Katolika Sento 1975, ankaŭ la lastajn numerojn de 1974.

ROMA ESPERANTO VOĈO

n° 130-131

ATENTINDA ALVOKO AL NIAJ GELEGANTOJ

Kun favora kaj efektiva apogo de Doc. D.ro Romvaldo Gustaw, direktoro de la Universitata Biblioteko ĉe la Katolika Universitato en Lublin - Polujo, estis fondita aparta fako de esperanta libraro, kiel bazo por venonta memstara Esperanto-Biblioteko. En la unua fazo de evoluo ni akceptos dankoplene malavaran helpon de la tutmonda bonfarantaro. Mobilizu niajn geamikojn alsendi scienc-kultur-valorajn verkojn, ankaŭ manuskriptojn. Adreso: Universitata Biblioteko de la Katolika Universitato, 20-023 Lublin, str. Chopin 27. Polujo.
La unua ekspozicio de la Esperanta libro en la Katolika Universitata Biblioteko de Lublin havos lokon inter 24-30 oktobre, ĉijare.

Zamenhofane via, D.ro Ceslao Biedulski

Batalantoj de Kristo kantas:

Ni falas, jen,
ni mortas, Kristo,
kiel branĉo
morte svena:
folio post foli',
pro amosent',
pro sento oferema,
kiel Vi, ho Kristo,
sangoplenaj.

Ni falas, jen,
ni mortas, fine,
kiel branĉo
morte svena:
folio post foli',
por ke ni ĉiuj
iun tagon,
kiel Vi, ho Kristo,
kiel branĉo,
reviviĝu.

Jozefo Riječanin

# APOGENDA ALVOKO

La Katolika Universitato en Lublin, Pollando, Altlernejo, kiun subtenas nur la oferdonemo de la pola katolikaro, jam ekde 1918 formas katolikan inteligentularon, laŭ la fluoj kaj la atingoj de la pola kaj tutmonda scienco. Dum la dua mondmilito ĉesis ties instrua aktiveco. La okupinto detruis la libraron, aliigis la konstruaĵojn al kazerno kaj soldathospitalo. Multaj profesoroj kaj studentoj estis arestitaj, multaj mortis jam en la unuaj tagoj de la milito. Post ĝia fino, estiĝis la Lublina Universitato, kiu komencis sian sciencan kaj instruan laboron, en ĉiuj fakoj, jam aŭtunon de la 1944 jaro. Malrapide kreskis la nombro de la studentaro kaj la nombro de la libroj en la Universitata Biblioteko. Fondiĝis novaj sekcioj, katedroj, fakultatoj, specialaj institutoj. En 1946 komenciĝis filozofia fakultato, sekcioj historia, arta, filologia.

Nuntempe ekzistas en la Universitato kvar fakoj: pri teologio, pri kristana filozofio, kanona juro kaj humanismaj sciencoj. Krome, pluraj institutoj kaj interfakultataj katedroj. Ekzemple, bone evoluiĝis Instituto pri Eklezia Muzikologio, Centro por Arkivoj, Bibliotekoj kaj Muzeoj. Ekde la lasta jaro 1973 laboras Instituto esploranta la problemon pri poloj vivantaj eksterlande kaj pri animzorgado inter la elmigrintoj, por kiuj estas en Polujo organizataj specialaj kursoj de pola lingvo kaj kulturo.

La nombro de studentaro superis duan milon. Pli ol 300 sciencistoj, ofte en ne facilaj loĝkondiĉoj, ne ĉesas prelegi en altnivelaj kursoj, organizas seminariojn kaj ekzercojn. La Akademia Teatro kun sukceso specialiĝas en religia dramo; la Koruso de la Eklezia Muzikologio kaj la Koruso de la Altlernejo mem, koncertis ne nur



Esperanto Kapelo en Zabrze/Pollando/.



Beata Patro Kolbe - preĝu por ni




Pastro H. Paruzel, kiu skribis por nia revuo la du al vokojn, dediĉis en sia preĝejo de Zabrze, nome de la Pola Katolika Unuiĝo Esperantista, kapelon al la beata Maksimiliano Kolbe, kun suraltara statuo pri la nova beatulo, memorigante krome, ankaŭ per ĉi tiu panelo, lian altan estimon al la Esperanta idealo.

---

enlande, sed ankaŭ ekster la polaj limoj.

Ĉiuj studentoj pliprofundigas la studojn, profitante el mi loj da libroj kaj revuoj en kelkdek fakoj. Plej multajn eblojn donas la ĉefa Universitata Biblioteko ĉe la strato Chopin, N° 27, posedanta libraron kun pli ol 600 mil volumoj kaj 1.500 revu-titoloj. Impresas ĝia moderne prilaborita katalogo kaj granda lego-salonego kun 200 lokoj por scienclabori 12 horojn dumtage.

Specialaj fakoj en la biblioteko montras al ni eldonojn diversajn, inter ili ankaŭ en la Zamenhofa mondlingvo. Tiu lasta havas ŝancojn fariĝi aŭtonomia Esperanto-biblioteko disvastigata kaj riĉigata sub la patroneco de la Katolika Universitato en Lublino. Ja la K.U.L.'a Biblioteko senĉese pligrandigas sian libraron per novaĉetoj kaj interŝanĝoj, fine per donacoj, kiujn faras la bonfarantoj ofte anonimaj. Per ĉi tiu artikolo la Profesoro ĉe la K.U.L.'a Universitato, D-ro Ceslao Biedulski, alvokas ĉiujn samideanojn, kiuj krom la Londona kaj Viena libraroj deziras posedi similan, seriozan Esperanto-centron, ĉe la tutmonde konata kaj estimata Universitato, ke ili bv. sendi sciencajn, valorajn esperantajn librojn, eĉ manuskriptojn je la adreso: UNIVERSITATA BIBLIOTEKO de KUL, 20-023 LUBLIN, str. Chopin nr. 27. Pollando.

La sciencista Asocio de K.U.L. aperigas regule Teologiajn Analojn, Filozofiajn Jarlibrojn je kvar temoj: teoria, psikologia, naturscienca kaj sociologia. Krom Analoj humanistaj, estas eldonataj diversscienaj Kajeroj, inter kiuj pri Arkivoj, Bibliotekoj kaj Ekleziaj Muzeoj, bultenoj, lernolibroj kaj ĵurnaloj por la studentaro.

Ekestas intereso por eldoni bultenon informantan pri la sciencista vivo en la Universitato ankaŭ en Esperanta lingvo. Atentindan vivon disvolvas en la Altlernejo kelkaj studentaj sciencaj rondoj, inter kiuj certe reaktiviĝos jam baldaŭ Scienca Rondo de junaj esperantistoj.

K.U.L. estas Universitato kuniganta en sia tutlanda agado junularon el ĉiuj partoj de Polujo. Universitatajn gradojn, magistran kaj doktoran titolojn, en multaj kampoj, atingis pli ol kvarcent pastroj kaj ĉirkaŭ cent religiulinoj. La Pola Episkoparo plejgrandparte posedas

finintojn de la K.U.L.'o. Sekve realisme estas pensi, ke ju pli disvolviĝos nia scienca centro ligita kun la Esperanto-movado, des pli bone plenumos nia IKUE sian rolon en la Kristana Eklezio. Ĝia estonto, kiel la bezonoj de la K.U.L.-altlernejo, estas granda precipe pro tio, ke oni jam realigas ĝeneralan renovigon de la Universitatoj kaj tiun de ĝiaj imponaj konstruaĵoj.

P.H.Paruzel

..................................................................

SENPAGA SIDEJO POR I.K.U.E - U.E.C.I en via Francesco Berni (ĉe Piazza S. Giovanni), 9 - Romo - estis malavare asignita de sac. Prof. Angelo Duranti, Direktoro de la esperanta Biblia Revuo.

Temas pri tri ĉambroj, apartenintaj al Maria Farsetti, el Ravenna, sed kiu de 1930 translokiĝis al Romo, kie ŝi mortis en 1953, lasante pro sia vivo ĉe multaj romanoj neforgeseblan sanktecan parfumon. Fakte, p. Antonio Cairoli ofm. transprenis la taskon enkonduki la kanonizan proceson por ŝia sanktigo.

La malgranda apartamento, ekipita per telefono: 758.83.88 kaj per sekretariino:(feriaj tagoj: de 15,30 al 18.00 h.; festoj kaj dimanĉoj: 9 - 12 h.) gardas memoraĵojn de la pia virino kaj kolektas jam multajn dankajn votoferojn "pro ricevitaj gracoj". En la kapeleto oni povas ankaŭ celebri meson. Bedaŭrinde la "Centro Esperantista Cattolico Romano" ne povos jam profiti tiun ŝancon pro la malvasteco de la lokalo (kutime le ĉeestantoj estas inter 15-20 ĝis 50 kaj pli). Tio, espereble, okazos, kiam la religia institucio "Maria Farsetti" estos aliiĝinta, laŭ ŝia deziro, al ripozdomo por maljunaj sacerdotoj kaj senhelpaj malriĉuloj.

El ĉi tiuj anonc-linioj iru niaj dankoj al la bonfaranto

P. Duranti pro lia donaco, kiu tuj vekis ĉe multaj ambiciajn projektojn.

KVANKAM PASINTJARE NI VOLIS eksperimente daŭrigi dum la somero la dimanĉan meson en Esperanto kun la sekvanta kunveno, tamen ni vidis, ke ne estas facile kolekti nombron da samideanoj, sufiĉan por la tasko. Tial ĉijare ni decidis haltigi denove tiujn renkontiĝojn dum la varma sezono, kiam preskaŭ ĉiuj aŭ partoprenas en Esperantaj kongresoj, aŭ serĉas iom da pli milda aero for de nia urbo. Efektive venis al Romo pluraj eksterlandaj esperantistoj el Eŭropo, Azio kaj Ameriko, sed ili ankaŭ devis konstati, ke ilia voĉo estis de parolanto en dezerta Esperantujo!

Ekde la unua dimanĉo de oktobro (je la 6a de oktobro) ni doree havos niajn kutimajn mesojn en S. Prakseda (ĉe placo Sankta Maria Maggiore), kun la posta kunveno. Kaj ĉar la nova jaro promesas al ni estijaro de intensa laboro, ni esperas, ke ne nur ni estos ĉiam nombraj, ke ne nur ni perfektiĝos en la internacia lingvo, sed ke oni strečos ĉiujn fortojn por plivastigi la bazon de la esperanta medio, multe pli ol ĝis nun ni sukcesis fari.

---

## El la Katolika Eklezio

---

KONTRAŬ MISINTERPRETOJ kaj manipuladoj de encikliko "Ecclesiam Suam" atentigas P. Raimondo Spiazzi, prez. de la Supera Instituto pri Religiaj Sciencoj "Mater Ecclesiae", per artikolo publikigita de "L'Osservatore Romano". P. Spiazzi reliefigas ke, pretekste de dialogo, oni ofte transpasis al miskompreno kaj alvenis al tiu malcerteco de la kristanaj veroj, kiuj o-

kazigis la konatajn devojiĝojn.

"En teologio - skribis P. Spiazzi - oni kelkfoje opiniis, ke dialogi signifas disverŝi aŭ eĉ perforte trudi iun ajn opinion, eĉ la plej malproksiman de la kristana kredo, ne kalkulante tiun "regulon pri kredo", kiu gvidas en la interpretado mem de la revelaciaj fontoj. Multaj farîs ... regulon al si mem kaj pretendis trudi sian regulon al la instrua aŭtoritato de la Eklezio. Rezulto: kredokrizo en pluraj kazoj kaj preskaŭ ĉiam foresto de bona teologio.

En la disciplina plano kelkaj opiniis, ke la dialogo nuligas la virton de obeado kaj forprenas la devigan forton de l'aŭtoritato, kaj sekve de la leĝo mem. Rezulto: principa kontestado kaj tendenca anarkio unuflanke; kaj el la alia, ia nekapableco de tiu interpretado kaj gvidado, kio apartenas al la aŭtoritato.

En la paŝtista plano - asertas ankoraŭ P. Spiazzi - oni opiniis, ke la dialogo permesas ĉiujn spertaĵojn, eĉ la plej strangajn kaj rajtigas ĉiujn troaĵojn kaj ĉiujn pretendojn meti la hierarkian Eklezion fronte al plenumitaĵoj, klopodante submetigi ĝin al sia legadmaniero de la signoj de tempoj, anstataŭ helpi ĝin al necesa sinkontrolo inter la ŝanĝiĝemaj mondkondiĉoj kaj la eternaj postuloj de la dia vorto. Rezulto: malstreĉiĝo de la unuecaj ligiloj en la eklezia komunumo.

En la soci-politika plano oni opiniis, ke pro dialogo kaj erare konjektita "koncilia" spirito ne plu necesas rilati al moralaj kaj religiaj postuloj de la homa ekzisto, kiel al kriterioj, kiuj rekuligas kaj kondiĉas siajn decidojn. Kaj tiel oni alvenis al paradoksaj postsekvoj.

Per ĉiuj ĉi tiuj falsaj interpretadoj kaj manipuladoj de "Ecclesiam Suam" kaj de la Koncilio - konkludas la artikolisto - oni senigis je senco la dialogon, ankaŭ pro

la novaj dogmismoj kaj absolutismoj kontraŭmetitaj al ĉiu logika kaj aŭtoritata eklezia indiko; oni kreis konfuzon kaj malcertecon interne de la Eklezio, kaj ekstere oni forigis ĝian kredindecon, ĝuste kiam pli urĝa, pli atendata kaj akceptinda estis ĝia atesto unueca kaj kohera al la certecoj, kiuj ne forpasas".

"JUBILAEUM" ESTAS LA TITOLO de monata bulteno, kiun eldonas la Centra Komitato por la Sankta Jaro. Inter la tre interesaj studoj, kiujn oni povas legi tie, troviĝas artikolo de Prof. Marc Tanenbaum, direktoro de la juda amerika komitato por la naciaj interreligiaj aferoj, kiu pritraktas la originon de la Sankta Jaro "en la hebrea jubilea jaro".

El tiu studo ni informiĝas, ke la jubileo havas pli ol du mil jarojn en la juda historio kaj estis celebrita preskaŭ 37 fojojn malgraŭ deportadoj kaj diasporo (Josuo estis la unua, kiu celebrigis ĝin post okupacio de Palestino; de tiam ĝi ripetiĝis ĉiun kvindekan jaron, ĝis la detruo de la unua templo; post alia ciklo, inaŭgurita de Esdro, viciĝas dudek jubileoj, de la detruo de la dua templo ĝis hodiaŭ, laŭ la rabenaj kalkuloj).

Prof. Tanenbaum, male de la plej arto de la modernaj ekzegezistoj, donas al la vorto "yobel" signifon de festado, kiel faris la Vulgato, tradukante tion per "jubilo". Laŭ li la jubilea jaro estis vere dekretita de Dio en revelacio al Moseo kiel jaro de malplipeza liberigo, kaj pro tio pli facile observebla, kiu perfektigadis la Sabatan jaron, en kiu estis ordonita liberigo de sklavoj kaj kaptitoj, redono de akiritaj kampoj, liberigo de ŝuldoj, fordono de pruntedonaĵoj, ktp.

Celo de la jubilea jaro estis do fizika kaj socia liberigo, kiel vojo al pli perfekta liberigo spirita kaj morala.

Tiel forigo de sklaveco respondas al la celo de la homa liberigo; la fordono de la patriarkecaj proprietoj kaj de la materiaj havaĵoj respondas al la celo de ekonomia justeco; ripozo de la tero kaj liberigo de bestoj respondas al la ekologia celo; kaj la kreo de spirita demokratio per la intensa tutjara pedagogio de la leĝo kaj per la popola asembleo, kiu ĉiun kvindekan jaron devas kunveni, respondas al la eduka celo.

Interesa estas ankaŭ la longa deflankiĝo en la studo de la religia leĝo, kiu protektas malriĉulojn kaj klopodas malpliigi la abomenaĵon de la antikva sklaveco. La liberigitoj de sklaveco, okaze de jubileo, fariĝas nur sklavoj de Dio. Tanenbaum memorigas, ke neniam hebreo, kiu sklaviĝis pro ŝuldoj aŭ aliaj motivoj, povis esti ekspoziciita en publika vendejo "por eviti homan humiliĝon"; ĉi tiu delikateco etendiĝis ankaŭ al alirasaj sklavoj. Ankaŭ la reveno de la tero al ĝia unua proprietulo respondas al religia postulo: la tero apartenas al Dio, kiu disdonis tion al la triboj de Israelo. En la jubileo ne estas forigata privata proprieto, sed estas donata speciala protekto al tiuj, kiuj fariĝis malriĉaj; tiel oni evitas akumulon de riĉeco kaj monopolon.

En la hebrea historio la celebrado de la jubilea jaro estis ĉiam kunligita kun la Sabata Jaro, kies projekcio ĝi estis. Ofte tiu observado rilatis nur malmultajn regionojn; modifiĝis ankaŭ tra la jarcentoj la aplikado de la leĝo pri ŝuldoj; kaj revenigo de la kampoj al la unuaj proprietuloj estis plurfoje prokrastita, ĉar Palestino estis okupita de invadintoj; sed neniam oni forgesis pri la mosea leĝo, kaj laŭ oportuneco oni riparis la antaŭe ne plenumitajn devojn.

PREPARE AL LA JUBILEO. "Tio, kio pli ol ĉio donis al ni zorgojn, estis la trafiko de Romo kaj la publika se

kureco" - deklaris Mons. Antonio Mazza, ĝenerala sekretario de la Komitato por la Sankta Jaro, parolante al ĵurnalistoj pri la preparoj por la Jubileo kaj pri la antaŭvidoj, kiujn oni povas fari rilate al pilgrimadoj.

Pri la trafiko la prelato diris, ke de la urbestro estis donitaj garantiojn pri parkadoj, pri taŭga cirkulado kaj pri amasigo de la trafiko disde la Sankta Petro-placo. Sed oni ne povas antaŭvidi grandajn pristratajn aranĝojn, kiel estis tiuj realigitaj por la Olimpiadoj de 1960, pro teknikaj kaj tempaj kaŭzoj. Oni zorgas aparte pri higieno, precipe rilate la purigon de la urbo. La sekureco, laŭ garantiojn de la itala interministeria komitato, estos komisiita al policaj trupoj "alte kvalifikitaj".

Pri la alfluo de pilgrimantoj estas malfacile nun doni antaŭvidojn. Ekonomiaj kaj politikaj faktoroj influas la kalkulon kaj ĝis nun estas anoncitaj nur sescent pilgrimadoj laŭ ĉirkaŭ 800.000 "ĉeesto-tagoj". Romo povos akcepti ĉirkaŭ 40.000 personojn ĉiutage. Oni povus antaŭvidi do alfluon de kvin milionoj da pilgrimantoj.

Tendaro estos starigita ĉe "Tre Fontane" por junuloj, kaj oni projektis pretkonstruitan gastejon verŝajne laŭ Flaminia strato. La religiaj institutoj akceptos ĉirkaŭ 14 mil personojn ĉiutage. Laŭ la porsaniga vidpunkto estos rezervitaj en la romaj hospitaloj litoj por pilgrimantoj eventuale malsaniĝintaj.

Antaŭvidita estas "vademecum" por pilgrimanto. Temos pri saketo, kiu kostos 2.500 lirojn, kaj kiu estos pretigata laŭ du milionoj kaj duono da ekzempleroj. Ĝi entenos seslingvan gvidlibron por la pilgrimanto kaj insignon, kun pilgrimkarto, kiu permesos rabatojn en transportoj kaj muzeoj, kaj septagan asekuron kontraŭ akcidentoj. La saketo estos disdonata al la interesitoj en

ĉiu lando zorge de la naciaj komitatoj.

Inter la multaj manifestadoj estas projektita "porrepaci ga marŝado",en kiu partoprenos ĉiulandaj junuloj, eĉ apartenantaj al aliaj kristanaj konfesioj, kiuj, per dum semajna marŝado,venos al Romo el Asizo, portante la pacan olivon al la tombo de la apostoloj.

Por la junuloj estas interalie antaŭviditaj granda folklo ra manifestado en la Sport-palaco, kaj folk-festivalo , en kiu partoprenos ensembloj kun muzikoj laŭ religia karaktero. Oni organizos ankaŭ sportajn pilgrimadojn al sanktejoj, kiel, ekzemple, al la Madono de Gisallo, sportista celo.

Pri la kultura plano estas projektitaj manifestadoj pre tigitaj de la Akademio Sankta Cecilia, de la Operejo kaj de RAI-TV.

SEMAJNO - TIPO POR LA CELEBRADOJ de la Sankta Jaro estis proponita de la Centra Komitato por Jubileo. En ĉi tiu kadro la pilgrimantoj piediros - laŭ ebleco - dum sep tagoj aŭ malpli, sin kunigante kun la preĝanta komunumo, al la kvar patriarkaj bazilikoj kaj al la katakomboj aŭ aliaj memoraĵoj de martiroj kaj sanktuloj.

En la liturgiaj celebradoj de ĉi tiu semajno-tipo troviĝas: ĉiudimanĉe en la baziliko de Sankta Petro, liturgia ko muneca celebrado kun eventuala partopreno de la Papo; dum ĉiuj feriaj tagoj, en la kvar bazilikoj kaj en la katakomboj, komuneca celebrado je la 9,30 h., kiu havos malsamajn aspektojn laŭ la malsamaj lokoj: en S. Petro ĝi akcentos la apostolecon de la Eklezio; en S. Johano de Laterano, la unuecon de la Eklezio; en S. Maria la Granda, la sanktecon de la Eklezio; en S. Paŭlo ekster la Muroj, katolikecon kaj ekumenismon ; en la katakomboj, la unuan kristanan ateston. Aliaj celebradoj,

laŭ neceso, povos esti celebrataj en apudaj preĝejoj. Ĉiun posttagmezon en S. Petro estos krome celebrata a parta'bfico de la Jubileo". En kelkaj solenoj estos celebrataj krome liturgioj laŭ malsamaj orientaj ritoj.

Kiel preparo kaj integrigo de la eŭkaristiaj komunecaj celebradoj, okazos en bazilikoj kaj katakomboj pentaj ritoj, kun ebleco de la repaciga sakramento. En la menciitaj preĝejoj kaj en la apudaj estos pliigata la nombro de konfesprenantoj. En pluraj preĝejoj oni povos partopreni en la solena adorado de l'Eŭkaristio. Estos gvidataj ankaŭ kunvenoj inter malsamaj grupoj por interŝango de informoj, spertoj, spiritaj perspektivoj. Apartaj zorgoj estos donataj por ekumenaj renkontiĝoj ĉe la kapelo de "Russicum", la monakejo de la Trapistoj ĉe "Tri Fontoj", la baziliko de Sankta Kruco en Jerusalemo, kaj aliaj preĝejoj naciaj aŭ aliaj katakomboj.

Dum la Sankta Jaro ne mankos rilatoj al la Misioj. Estas antaŭviditaj: la Tutmonda Tago por misioj; baptoj de adoltoj de misiaj landoj dum la paska antaŭtago; filmoj kaj dokumentadoj; vizito al la misia muzeo en Vatikano, ktp.

LA CENTRA KOMITATO POR LA SANKTA JARO akceptis mesaĝon venintan el grupo de junuloj el 14 ŝtatoj kaj 5 kontinentoj, proponantan kadron da celoj laŭ la mentaleco de junuloj, rilate la Sanktan Jaron.

Inter la petoj pli insiste proponitaj estis aparta preĝejo, en kiu ili povus kuniĝi vespere por medito kaj preĝo. Oni decidis, ke tio okazu lunde, merkrede, ĵaŭde kaj vendrede de la 18a ĝis la 19a h. ĉe la preĝejo de la "Piccole Suore di Gesù" (Fratinetoj de Jesuo), apud "Tre Fontane", preĝejeto tre simpla, apartenanta al komunumo dediĉita al kontemplado. En la apudeco oni pretigos grandan kampadejon por junuloj intencantaj lo

ĝi en Romo. Krome, ĉiun mardon kaj ĵaŭdon, dum la Sankta Jaro okazos en la katakomboj de S. Kalisto, internacia junulara renkontiĝo, kaj ĉiun vendredon "Krucvojo" en la S. Petro-placo, kun la aliaj pilgrimantoj.

Ĉi tiuj renkontiĝoj estos animitaj de junulaj ekipoj el pluraj nacioj, apartenantaj al la movado GEN, tio estas "Nova Generacio", kaj al la movado de la "Hejmaj Fajrejoj". La junulara meso okazos ĉiun sabaton je la 19 h. en la baziliko de S. Cecilia en Trastevere, kaj ĝi taŭgos por la dimanĉa porjunulara meso.

Inter la ĉefaj eventoj de la junulara kalendaro por la Sankta Jaro 1975, estos: en marto "GEN-Fest", t.e. internacia renkontiĝo por kantoj kaj folklora muziko laŭ religia inspiro; je la 9a de marto, kunveno de junuloj de la komunecoj edukaj kaj asistaj; de 23 ĝis 30 en la sama monato: internacia marŝado de la kristana repaciĝo de Asizo al Romo; en aprilo: Tago de la kristana junulara atesto; 22-26 de aŭgusto: internacia pilgrimado de la junularo; 19-21 de septembro: dua poratesta renkontiĝo de la komunumoj edukaj-asistaj. En oktobro: granda pilgrimado de sportistoj, iniciate de lombardaj sportistaj sanktejoj.

SANKTA JARO POR LA NOMADOJ. Ankaŭ la nomadoj, kies vivo estas entute pilgrimado, venos al Romo dum la Sankta Jaro. Estis facile tion diveni, ĉar oni konas, kiom ilia animo estas malfermita al la religia realo, kaj ke tradiciaj estas iliaj vojaĝoj al la grandaj sanktejoj de Lurdo, Fatimo kaj Kompostelo. Tiel oni antaŭanoncas ilian amasan pilgrimadon en la jubilea jaro ĉirkaŭ la fino de aŭgusto 1975: dum tri tagoj ili plenumos la jubilean viziton al la Bazilikoj, la Krucvojan praktikon; ili partoprenos en ekumena celebrado; kaj oni profitos por doni al ili specialajn instruadojn pri religia vivo.

En februaro, kiel preparo, oni pritraktos en interna-cia kunveno la problemojn de la nomadoj, ĉar ili estas multnombraj kaj tute apartaj. Ili iras de la agnosko pri iliaj homaj rajtoj, spiritaj kaj civilaj, ĝis la devo de la kristanaj komunoj partopreni kun metodo en ilia misia evangelizado.

SOLENA SACERDOTA ORDINADO, kiun la Papo mem celebros je la 29 de junio 1975, estis anoncita por la kalendaro de la Sankta Jaro. La dato estis jam diskonigita al la episkopaj konferencoj, por ke ili informu as-pirantojn al sacerdoteco pri ebleco de ordiniĝo en Ro-mo permane de la Papo.

POR LA SANKTA JARO: telefonaj kaj poŝtaj servoj. Serio da intervenoj pri telekomunikoj, televidaj kaj po-ŝtaj servoj estos disvolvitaj por la pli grandaj postuloj de la venonta jaro pro la escepta jubilea alfluo da ek-sterlandanoj. Tiuj decidoj estis parto de la intermini-steria programo por la Sankta Jaro. Siaflanke SIP kaj Italcable (Italaj Societoj por telefonaj servoj) zorgos pri internaciaj kaj interkontinentaj cirkvitoj. Markaj telefonaparatoj kaj "telex-budoj" estos instalitaj ĉe ho-teloj kaj pilgrimcentroj, stacidomoj, flughavenoj. Es-tos ankaŭ plivastigita kaj plibonigita la surmara radi-telefona servo por ŝipoj.

Pri televidaj servoj la RAI sin metos je dispono de ek-sterlandaj organizoj por dissendi la plej gravajn mani-festadojn de la jubilea periodo. La servoj de la Urbo e-stos perfektigitaj eĉ per poliglota personalo kaj estos akcelitaj la dek poŝtaj filioj jam antaŭviditaj por 1974. Oni ankaŭ decidis eldonon de memorigaj poŝtmarkoj kaj apartajn stampojn rilatantajn al la Sankta Jaro.

TOMASO KAJ BONAVENTURO, sanktuloj kaj doktoroj, kuniĝas en elmontro organizita ĉe la Apostola Vatikana Biblioteko, en la Ksista salono. Je la 9a de julio Paŭlo 6a malsupreniris de sia loĝejo por omaĝi la du grandajn teologojn, kies manuskriptoj estas kolektitaj en la plej vasta kaj bela salono de la Vatikana Biblioteko.

Raraj kaj valoraj estas la eksponitaĵoj: troviĝas la aŭtografa kodekso de la komento de Tomaso pri la 3a libro de la Sentencoj, inkunabloj pri verkoj de la du sanktaj doktoroj inter 1470 kaj 1500; kompletaj kolektoj pri iliaj eldonitaĵoj en diversaj epokoj; kvar tre valoraj Tomasaj kodeksoj apartenantaj al la Kverini-a Biblioteko de Brescia.

La Papo trairis malrapide la salonon, rigardante ĉiujn ekspoziciitajn verkojn kaj interparolante kun la spertuloj, kiuj ilustris iliajn karakterojn. Fine de la vizito Paŭlo 6a esprimis sian admiron kaj donacis al la Biblioteko la unuajn kvin volumojn de la "Index Thomisticus", diligenta eldono kompilita zorge de p. Busa de la "Aloysianum" en Gallarate (v.K.S.-on, Julio 1973, paĝ. 148), kaj serion da ne eldonitaj fragmentoj de la 5a kaj 6a jarcento.

Venontjare la Vatikana Biblioteko, por soleni sian kvinan jarcenton, pretigos tre gravan historian elmontron.

LA VATIKANA APOSTOLA BIBLIOTEKO. Preskaŭ tri mil intelektuloj el 45 nacioj frekventis lastjare la Vatikanan Apostolan Bibliotekon por studo. En la sama periodo pli ol 600.000 fotoreproduktaĵoj de manuskriptoj kaj de tre raraj libroj estis senditaj en ĉiun mondparton laŭ peto de institucioj aŭ de unuopaj priserĉantoj. Tion deklaris el la Vatikana Radio la Prefekto de la Biblioteko mem, la aŭstria salezano don Alfonso Sti

cker, kiu ankaŭ informis, ke ĉi tiu Biblioteko - unika en la mondo, fondita en 1475 de Papo Ksisto 4a - posedas hodiaŭ ĉirkaŭ 65.000 manuskriptojn ekde la 3a jarcento, inter kiuj la faman Biblian Kodekson en la greka lingvo, kelkajn el la plej antikvaj manuskriptoj de Virgilio, Danto, la "Canzoniere" de Petrarko; ok mil inkunablojn, inter kiuj surpergamenan biblion de Gutemberg; pli ol cent mil aŭtografaĵojn, multajn milojn da gravuraĵoj kaj geografiaj mapoj kaj preskaŭ unu miliono da presaĵoj.

Al la Biblioteko kuniĝas ankaŭ numismatika kolekto pri medaloj kaj tre raraj moneroj, kaj muzeoj pri religiaj kaj pri profanaj objektoj.

SACERDOTOJ EN LA MONDO. En la volumo "Attività della S. Sede 1973" oni legas jenajn statistikojn: "En la momento de la statistikoj la sacerdotoj en la mondo estis 343.329. El ĉi tiuj, la diocezaj pastroj estis 229.061, dum la religiuloj estis 114.268. Kompare kun la antaŭa jaro, oni rimarkas malpliiĝon de 2907 unuoj. Pli precize, la diocezaj pastroj malpliiĝis je 3.291 unuoj; male, la religiuloj kreskis je 384 unuoj.

PLI OL MIL ESTAS LA PERMANENTAJ diakonoj, edziĝintaj aŭ fraŭloj, ordinitaj ĝis nun en la Katolika Eklezio. Kaj pli ol duono el ili - 568 - estas de la amerika kontinento (400 en Usono), 306 en Eŭropo, 30 en Afriko.

LA DOKUMENTO DE LA ROMA KONGREGACIO por la katolika instruado: "Edukaj orientiĝoj pri la sacerdota formiĝo", povas esti dirita nova decida interveno de la S. Seĝo por la sacerdota fraŭleco. La dokumento, sendita al la episkopoj de la tuta mondo, por helpi en la for

mado de seminarianoj, konsistas el kvar ĉapitroj kaj naŭdek paragrafoj, kaj estis pretigita de spertuloj pri teologiaj kaj homaj sciencoj, en plena akordo kun la episkopaj konferencoj. Ĉefa temo estas: pretigado de kandidatoj al sacerdoteco, por ke ili vivu en ĉasteco kaj sin preparu por akcepti senrezerve fraŭlecon por la regno de la ĉielo.

La prilaboro de la dokumento estis stimulita krom de Paŭlo 6a, ankaŭ de la episkopa Sinodo kaj de multaj pri seminariaj rektoroj. En la permesema medio, inter la temoj, pri kiuj oni pridiskutas, ne estis esceptita la konsekrita virgeco. Aliflanke la malabundo de fraŭla klerikaro invitis multajn peti por la latinrita Eklezio enkondukon aŭ renovigon de la modelo de edziĝinta sacerdoto. La propono longe diskutita en la lasta sinoda asembleo, ne atingis la plimulton de la konsentoj. Tiel la celo de Paŭlo 6a gardi en la latina Eklezio la unikan klerikan modelon ĝis nun ekzistantan, firmiĝis.

La dokumento de la Kongregacio por la katolika instruado celas respondi al demandoj, kiujn pri la sacerdota fraŭleco oni ĝis nun metas, kaj samtempe helpi kandidatojn al sacerdota stato kaj iliajn edukistojn por superigi tiujn malfacilaĵojn, kiuj pli kaj pli ŝajnas esti favorataj de la materia progreso.

"La fraŭleco - estas dirite en la dokumento - havas evidentan pozitivan valoron, kiel tutecan sindonon por la praktiko de la sacerdota ofico kaj kiel rimedon por sin konsekri al Dio per ne dividita koro; ĝi entenas el staran signon kaj ateston de amo al Dio. La Eklezio, postulante tion, havas profundajn motivojn, kiuj baziĝas sur la imitado de Kristo, sur la reprezentado de lia misio, kiel ĉefo de la komuneco kaj lia dispono por konstrui senĉese la Eklezion".

Inter sacerdota ofico kaj fraŭleco estas rilato de kongrueco, kiu aperas pli kaj pli granda laŭgrade de la kristologia, ekleziologia kaj eskatologia aspektoj de la fraŭleco. La moderna medio ne estas favora al ĝi; eĉ ĉi tiu suferas krizon, kiu ŝajnas malhelpi la sacerdotan taskon.

"En la konkreteco de niatempa vivo, la sacerdota fraŭleco evidentigas la neceson atingi efektivan homan maturecon kaj samtempe praktiki tiun individuan oferon, kiu estas esprimo de apostola karitato". "Celo de la seminariana formado - klarigas la dokumento - estas prepari maturan homon, kiu havas plenan konscion pri la devoj de sia vokiĝo, sacerdoton perfektan kaj fidelan."

Tiucele oni indikas edukajn rimedojn, kiuj povas plenumi la postulojn de pretigo pri integra homa personeco.

La dokumento pritraktas ankaŭ la problemojn de formado al konsekrita virgeco, ne esceptante tiujn, kiuj hodiaŭ estas pli pridiskutataj. Konfirminte, ke sekseco devas esti konsiderata kiel necesa faktoro por persona matureco, kaj ke la persono celanta maturiĝon, ĉiam devas luktadi, ĉar ĉiumomente li devas efektivigi elekton, la dokumento asertas, ke la virto, kiu reguligas la praktikadon de la sekseco estas "la ĉasteco, laŭnatura virto, sed kiu altiĝas al supernatura en la kristano".

Rilate priaman integriĝon la dokumento memorigas necesecon, ke la seminariano atingu "ĝustan ekvilibron, sinregadon, aŭ, kiel ofte oni ripetas, maturecan staton". Estas klare - agnoskas la dokumento - ke tiu maturiĝo povas esti akirita perfekte nur per kontaktoj kun aliaj personoj". "Pri rilatoj kun la alia sekso - estas ankoraŭ la dokumento, kiu tion konfirmas - oni konstatis dum ĉi tiuj lastaj jaroj rimarkindan evoluon". La ĝusta linio, kiun oni sugestas "estas tiu de vero kaj sincere-

co". Estas nepre ekskluditaj "ĉiuj rilatoj provokitaj aŭ celitaj nur por unuflanka persona avantaĝo, kiel por utiligi la alian personon al siaj celoj". Restas do "la komunaj kaj normalaj kontaktoj, kiuj okazas en la vivo".

Inter la obstakloj de la formado al ĉasteco estas alkalkulata aŭtoerotismo. La dokumento, dum ĝi asertas, ke edukisto ne povas resti indiferenta antaŭ la fermiĝo de horizontoj kaŭzita de tio, admonas, ke oni ne dramigu la fenomenon kaj ne malpliigu estimon kaj bonvolemon al la subjekto. En la kontakto kun la amo supernature oferema de la edukisto, la junulo perceptos, ke li estas akceptata en ama komuneco, kaj sin sentos fortirata el la fermiteco de sia memo".

La dokumento alfrontas, laste, la krizon de la sacerdota vivo kaj montras la kriteriojn por preventi ĝin. "La unua normo - oni asertas - estas pacienci kun si mem, sin akcepti senkolere". Necesas krome vigligi la senton de la kredo laŭ humila kaj aktiva kuniĝo kun Dio".

Konkludante, la dokumento akcentas, ke formado al sacerdota fraŭleco, por sukcesi, devas celi progreson kaj perfektiĝon de la persono, laŭ lia tuteco plej kompleta kaj originala". La homaj kondiĉoj, kiuj favoras la spiritan vivon, resumiĝas en la maturiĝa koncepto".

La dokumento de la Kongregacio por la katolika instruado estas malfermita al progreso de antropologiaj sciencoj, firma en siaj doktrinaj principoj, forte bazita sur personismo.

LA APOSTOLA DEVENO ESTAS BAZO de la sacerdoteco. -"Apostoleco de la Eklezio kaj apostola deveno" estas titolo de dokumento prilaborita de la intrernacia teologia komisiono, aperinta en "Civiltà Cattolica", prezentita de Mons. Giorgio Medina Estevez, membro de

la sama komisiono. Laŭ lia klarigo, la dokumento estis pretigita dum la plena kunveno de 1973 kaj perfektigita de subkomisiono. Sed mons. Medina avertas, ke la dokumento devas esti konsiderata nur kiel eseo por doktrina orientigo. Jen la ĉefaj punktoj, laŭ mons. Medina.

1) Apostoleco de la Eklezio kaj rekta deveno el la apostoloj estas du malsamaj realaĵoj, tamen interligitaj. Fakte ne sufiĉas "apostoleco de doktrino" por ke la Eklezio troviĝu laŭ la rekta deveno de la apostoloj. La fideleco al la evangelio devas esti daŭre priserĉata, sed ĝuste la historia kaj spirita deveno - unuvorte: la sakramenta - de la sacerdota ofico estis donita al la Eklezio, por ke la fideleco al la evangelio estu aŭtentike per ĝi certigita, pri doktrino kaj vivo.

2) La ekzisto de ĉi tiu apostola ofico en la komuneco kaj antaŭ ĝi estas necesa al la Eklezio, ne nur pro ĝusta ordo, sed pro instituto de Kristo, kion oni povas jam ekvidi en la evangelio, sed kio disvolviĝis laŭgrade dum la Nova Testamento kaj kies plena figuro aperas plenlume en la patristikaj dokumentoj pli proksimaj al la originoj.

3) La unika maniero konata en la kristana tradicio por transdoni la apostolan aŭtoritaton, estas la sacerdoteco, kiel ĝi estas praktikata en la Eklezio ekde ĝia komenco. La sacerdota ordino devas esti transdonita laŭ la eklezia intenco kaj kredo, de la sacerdotoj, kiuj enviciĝis ili mem en tiun oficon per ordino, laŭ ne interrompita sinsekvo.

4) La neceso de la ordino, kun ĉiuj ĝiaj fundamentaj elementoj, konsistigas la "punkton varman" en la diskutoj pri la agnosko de la sacerdotaj oficoj kun la ne katolikaj komunumoj. Ĝi estas la normo por prijuĝi ĉu ili estas vere ekvivalento de la pastra ofico de la antikva E-

klezio, gardata en la katolika Eklezio, kiel ankaŭ en la ortodoksaj kaj en la aliaj orientaj Eklezioj.

5) Oni ne povas tute simple jure agnoski la protestantajn diservojn kiel ekvivalenton de la katolika sacerdota ofico. Kvankam ekzistas ia komuna kredo - ankoraŭ malproksima de pleneco, malgraŭ kelkaj realaj alproksimiĝoj - necesa estos ordinado, ĉar la Eklezio ne disponas laŭ sia plaĉo pri la sakramentaj strukturoj, kiujn ĝi ricevis de Kristo, kaj kiuj enkanaligas la supernaturan oficon de la sacerdoteco.

Rilate la Ekleziojn, kiuj partoprenas en la anglikana komuneco (kiujn ofte oni konfuzas kun la protestantaj), la dokumento tekstas, ke "daŭras fruktoriĉaj dialogoj kun ĉi tiuj Eklezioj, kiuj gardis surmeton de la manoj, kvankam ŝanĝiĝis ĝia interpretado", kaj aldonas, ke ne estas nun eble anticipi eventualajn rezultojn de ĉi tiuj dialogoj, ankaŭ pro tio, ke la teologiaj renkontiĝoj celas ĝuste esplori, ĉu "la elementoj, kiuj konsistigas unuecon, inkluziviĝas en la gardo de la surmeto de la manoj kaj de la koneksaj preĝoj".

"LA INTERNACIA JARO DE LA VIRINO estos por la Eklezio tre taŭga okazo por pripensi pri la partopreno de la virino ankaŭ en la eklezia vivo. Ne nur kiel rajto-devo de la virinoj mem, sed ankaŭ kiel neceso, kiun la Eklezio mem sentas pri ĉi tiu kontribuaĵo de virinoj al sia misio. En la intencoj de la organizacio de UNO la internacia jaro celas ne nur elimini maljustajn diskriminaciojn rilatantajn al la virino, sed ankaŭ inviti ĉiujn spiritajn kaj religiajn fortojn, ke ili kunagadu kun la entreprenita tutmonda plano por justeco, progreso kaj paco. Ŝajnas al mi tre bonŝance, ke la internacia jaro de la virino koincidas kun la Sankta Jaro, kiu por ĉiuj membroj de la dia popolo estos okazo por pli plene

sin meti je dispono de la Sankta Spirito por la renovigo petita de la Koncilio".

Tiel deklaris, dum intervjuo ĉe la Vatikana Radio, doktorino Rosemary Goldie, vic-sekretariino de "Consilium de laicis" kaj membro de la aparta studkomisiono por la funkcio de la virino en la socio kaj en la Eklezio, kies tasko, ĝuste freŝdate, la Papo decidis plilongigi laŭ la tuta jaro 1975. Goldie, fokusigante la laborojn de la komisiono, memorigis, ke baldaŭ tiu organizo devos prezenti al la Papo la unuan raporton, kiu pri traktos rigardon laŭ la Biblio kaj la dia plano pri la homa persono kaj aparte pri la virina. Krom tio, la komisiono pretigas dokumentojn kaj pripensojn pri la aktuala partopreno de virinoj - religiulaj kaj laikaj - en la eklezia vivo.

Reliefiginte, ke la proksima episkopa Sinodo, pritraktante la temon de la evangelizado en la nuntempa mondo, devus sekve zorgi por malfermi la vojon al partopreno pli responda kaj efika de virino en la eklezia misio, la vic-sekretariino de "Consilium de laicis" precizigis tiamaniere la ĉefan kontribuaĵon, kiun la virino hodiaŭ povas doni al la Eklezio: "Ne temas pri iu aŭ alia punkto, sed pli ĝuste pri ebleco de aŭtentika kunlaboro inter viroj kaj virinoj en ĉiuj sektoroj. Ĉiu homa aktiveco pri penso, pri agoj, pri kunvivado, se ĝi volas esti plene homa, bezonas pri ĉi tiu kunlaboro. Temas pri vivkondiĉo.

Esence, do, la virino povos alporti pli da kontribuaĵoj al la paŝtista vivo de la Eklezio. Kondiĉe ke oni pretigu serioze virojn, virinojn, klerikaron kaj laikulojn. Formada laboro, ofte eĉ aliiĝo de pensmaniero por ebligi kunlaboron".

Fine, pri la maniero kunrespondigi la virinon pri paŝti

sta laboro, doktorino Rosemary Goldie diris: "Post la necesa formado, oni devas profiti pri ĉiuj eblecoj donitaj de la Eklezio post la Koncilio, kiu volis pli plenan partoprenon de la laikoj. Grava laborkampo estas, ekzemple, la familio, ne nur kiel objekto de paŝtisteco, sed ankaŭ kiel subjekto. Ankaŭ laikaj organizoj estos laborkampo de la virino, krom novaj strukturoj, kiel parokaj kaj paŝtistaj konsilioj. La virinoj portos al ĉi tiuj organizoj ne nur la sperton de sia familia vivo, sed de sia profesio, de sia socia kaj politika kulturo. Ili portos sian vivmanieron pri "esti Eklezio", pri preĝado kaj apostoleco. Sed ili povos eniri ankaŭ novajn vojojn por la vigligo de la eklezia komunumo. En Afriko, en la Latina Ameriko kaj aliloke, troviĝas virinoj, kiuj ricevis de la episkopo la plenan respondecon de eklezia aŭtoritato pri ĉio, kio ne estas strikte rezervita al la sacerdota ofico. Kaj kiom da eblecoj pri katekezo, asisto, ktp.! Ili ne estas novaĵoj por virino, sed verŝajne ili devos esti plenumataj kun plene rajtigita respondeco. Ne temas pri depostuloj, sed pri servopreteco por la Eklezio kaj ankaŭ por la homa socio".

LA TUTMONDA UNUIĜO DE LA katolikaj virinaj organizoj (UMOFC) havos sian proksiman asembleon en Dar Es Salaam, en Tanzanio, de 14 ĝis 24 de septembro. Preskaŭ 200 delegitinoj pri 120 organizoj, el ses kontinentoj, partoprenos en ĉi tiu renkontiĝo, kiun ĉeestos ankaŭ invititoj de aliaj kristanaj Eklezioj, de la Afrikaj episkopaj konferencoj, de organizoj de la Roma Kurio (Ŝtata Sekretariato, Laikara Konsilio, Komisiono por Justeco kaj Paco) kaj de aliaj katolikaj organizoj. La asembleo ekzamenos la faritan laboron en la kadro "eduka programo", proponita en la antaŭa kunveno (1970 j.) kaj decidos la laborliniojn de la venontaj jaroj. La asembleo okupiĝos ankaŭ pri la "Internacia Ja-

ro de la virino", proklamita de UNO por 1975. Lasta tasko de la asembleo estos la renovigo de la Konsilio (27 membroj), kiu direktos UMOFC dum kvar jaroj.

"DE MULTAJ LOKOJ ALVENAS AL NI demandoj, ĉu licas celebri la meson sen la sanktaj vestoj aŭ kun la nura stolo sur la talaro aŭ sur la civila vesto". Tiel skribas sur "L'Osservatore Romano" 28.7.74 Mons. A. Bugnini, Sekr. por la S. Kongr. por la Dia Kulto. Kaj li mem respondas:
"La motivoj de ĉi tiuj petoj venas plejofte el praktikaj cirkonstancoj, precipe okaze de vojaĝoj, pilgrimadoj, ekskursoj, kampadoj; sed ne mankas alispecaj motivoj, kiel konformiĝo al iu medio, kiam, ekzemple, fabrik-kapelanoj celebras laborveste en la establo mem, aŭ kiam oni celebras inter alpistoj kun gvidista uniformo. Kaj oni demandas de ni, kia estas pri ĉi tiu punkto la juĝo de la Eklezio. La respondo ne estas malfacila, se oni priatentas tion, kion ordonis dum ĉi tiuj jaroj la dispozicioj pri la liturgia renovigo. Antaŭ ĉio la "ĝenerala instrukcio" de la roma misalo. Je nombro 297 ĝi diras: "La diverseco de la servoj en la plenumo de la kulto, montriĝas ekstere per la diverseco de la sanktaj vestoj, kiuj pro tio devas esti signo de la ofico propra al ĉiu religia rito. Pro tio estas konvene, ke tiuj vestoj kontribuu ankaŭ al la inda aspekto de la sankta agado". Kaj je nombro 298: "La komuna vesto por ĉiuj diservistoj el ĉiu ajn grado estas la albo"; kaj je n. 299: "La propra vesto de la celebranta sacerdoto dum meso kaj aliaj sanktaj ritoj rekte al ĝi kunligitaj, estas la kasublo" (lat.: càsula; it.: pianeta).
Ĉi tiuj dispozicioj, kiuj estas eĥo de la tradicio kaj renovigas ĝin detale, estas bazo de la normoj en la aliaj dokumentoj koncernantaj la temon.

Ekzemple, la Instrukcio pri la sanktaj mesoj por apar-

taj grupoj (n.11-b), referencas tute simple la tekston de la roma misalo ĵus ekzamenita. La sama teksto estas citita de la tria Instrukcio (n.8-c), kiu aldonas:

"Malaprobita estas kuncelebrado aŭ celebrado, surmetante nur stolon sur la monaka vesto (froko), sur talaro aŭ civila vesto. Nek estas permesate plenumi la aliajn sanktajn ritojn, kiel surmeti la manojn okaze de ordinoj aŭ administri sakramentojn aŭ doni benon kun la nura stolo sur civila vesto".

El ĉi tiu normo la Sankta Kongregacio por la dia kulto neniam fortiriĝis, nek intencas fortiri sin, nek pri ĝeneralaj dispozicioj nek pri specialaj privilegioj.

Kaj simpla estas la motivo indikita de la ĝenerala Instrukcio: la distingo de la ordino, la indeco de la sankta agado, la neta disigo de sanktaĵo disde ĉio, kio estas profana. La komuneco volas esti respektata kaj volas percepti eĉ per la sensoj la signifon de la ritoj kaj tiel penetri la misteron.

Ununuran malgravigon oni enkondukis por faciligi la uzadon de la sanktaj vestoj eĉ dum vojaĝoj: la "kasublo sen albo". Temas pri perfekta kasublo, fermita ĉirkaŭe ĝis la taloj, kun stolo ekstere. En ĉi tiu kazo oni povas forlasi la albon. La kasublo povas havi ĉiam la saman koloron, dum la stolo ŝanĝebla povas indiki la koloron de ĉiu tago. Ĉi tiu sankta vesto faldita povas lokiĝi komforte en malgranda valizo. Sed ĝia uzado estas limigita al necesaj okazoj kaj devas esti rajtigita laŭ peto de la episkopa konferenco. Precizaj normoj reguligas ĝian uzon (v. "Notitiae" 81,1973,p.96).

S. Pio 10a skribis: preĝi bele! Tiam li aludis, ĉefe, al la kanto, sed tio validas por la tuta kadro de la celebrado. La sankta vesto estas unu el la plej gravaj kaj

samtempe sanktigaj elementoj.

Ĉiuj ĉi tiuj ritaj elementoj, deciditaj de la kompetenta aŭtoritato, devas esti gardataj kaj respektataj, por ke ĉiu interparolado de la komuneco kun Dio disvolviĝu per siaj kvalifikitaj oficantoj en kadro de soleno kaj indeco, kiu transcendu la tro terajn kutimojn de la ordinara vivo".

LA FREŜDATAJ VATIKANAJ DISPOZICIOJ pri la komunio. - Sur ĵurnalo "Avvenire" 24-7-74 Inos Biffi havas interesan studon pri uzado kaj disdono de l' Eŭkaristio. "Pri la maniero laŭ kiu oni povas disdori la Eŭkaristion - li skribas - la liturgia konstitucio donas nenian eksplicitan ordonon. Fakte, tio ne apartenas al la elementoj ne ŝanĝeblaj, ĉar el dia dispozicio" sed al tiuj, kiuj povas ricevi ŝanĝojn dum jarcentoj, aŭ kiuj devas aliiĝi, kiam en ili aperis kelkaj aspektoj, kiuj ne respondas al la naturo de la liturgio, aŭ kiuj fariĝis malpli oportunaj (art.21). Distribuado en la buŝon mem de la komunianto, ŝajnas al multaj ĉiam malpli oportuna. Pro du kialoj: unu el ia dignosento, kiu montriĝas mal inklina al enbuŝigo; kaj alia, kiu rilatas la aktivan partoprenon de la kredanto en la celebrado: ŝajnus pli klare signifa la gesto ricevi sur la manon la eŭkaristian panon, "preni kaj manĝi ĝin".

Pri la maniero de la disdono de la komunio, la Kongregacio por la dia kulto aperigis instrukcion je la 29a de majo 1969, titolitan: "Memoriale Domini". En ĝi:

1) "oni agnoskas, ke dum la jarcentoj la procedo de la mescelebrado kaj de la komunio variiĝis, kaj ke ankaŭ en nia tempo estis enkondukitaj en la ritonnovaĵoj, kiuj igas pli komprenebla la signon de la eŭkaristia festeno kaj la partoprenon en ĝia celebrado.

2) Pri la ricevmaniero: oni agnoskas la licecon - laŭ la plej antikva tradicio, ke la kredanto ricevu ĝin en la manon kaj komuniiĝu per si mem...

3) Ĉi tiu komunia maniero, nuntempe uzata en la tuta Eklezio, devas esti gardata, kaj esprimas la respekton de la fideluloj al la Eŭkaristio...

4) Kelkaj episkopaj konferencoj - oni aldonas - kaj kelkaj individuaj episkopoj petis, ke en ilia teritorio estu permesata la uzo deponi en la manoj de la fideluloj la konsekritan panon.

La Papo konsultis la episkopojn de la Latina Eklezio, kies plimulto montriĝis inklina, ke "la ĝisnuna disciplino restu senŝanĝa"...

5) Tamen en tiuj lokoj, kie la nova maniero estis akceptita, oni lasas al la episkopoj prijuĝi la cirkonstancojn: sed tiu uzado neniam povas esti permesata kiam estas danĝero de malrespekto aŭ de falsaj opinioj pri Eŭkaristio aŭ de aliaj ne decaj motivoj. Apartenas al la Sankta Seĝo konfirmi la decidojn de la episkopaj konferencoj, kiuj volas sekvi la novan manieron".

Kiel oni vidas, la ĝenerala aserto pri la gardo de l'uzo jam disvastigita pri la komunio sur la lango, ne estas tiel absoluta, ke oni ne permesas revenon al la antikva komunia formo kun la hostio deponata en la mano, kiam pro validaj motivoj oni petas tion de la episkopaj konferencoj.

Por kompletigi la instrukcion, estis publikigita la teksto de la letero, per kiu estas donita la privilegio disdoni la komunion sur la manon, kiam realiĝas ĉiuj postulitaj kondiĉoj, kun la rajto de ĉiu episkopo permesi tion en sia diocezo, entenata en la teritorio de la petanta episkopa konferenco. Rememoriginte, ke oni devas eviti ĉi

an eblecon de surprizo kaj danĝeron de malrespekto,oni donas la sekvajn normojn:

1) "La nova maniero en la disdono de la komunio ne devas esti deviga. La tradicia formo povas daŭri kune kun la nova, eĉ en la sama liturgia servo, laŭ la volo de la fideluloj.

2) Estas oportune, ke la nova maniero estu aplikata kun diskreteco, enkondukata laŭgrade, komencante de la plej bone pretigitaj grupoj, kaj estas necese antaŭprepari tiun enkondukon per konvena katekezo, por ke la fideluloj komprenu perfekte ĝian signifon, kaj tion plenumu kun la necesa respekto.

3) Ĉefe la ebleco donita al fidelulo ricevi en la manon kaj porti al la buŝo la eŭkaristian panon, ne devas esti por li okazo pritaksi ĝin kiel komunan panon. Tute male, ti o devas kreskigi la senton de lia digno, kiel membro de la mistika korpo de Kristo, en kiun li eniĝis per la bapto kaj la Eŭkaristio, kaj tio devas ankaŭ kreskigi lian kredon je la granda realo de la Korpo kaj la Sango de la Sinjoro, kiun li per siaj manoj tuŝas.

4) Pri la disdona formo estas permesate aŭ sekvi la antikvan tradicion, kiu, reliefigante la funkciadon de la pastro, deponigadis la eŭkaristian panon en la mano de la komuniiĝanto; aŭ elekti la plej simplan formon, permesante al la fidelulo mem preni la Eŭkaristion el sankta vazo, dum la sacerdoto diras: "La Korpo de Kristo". Ĉiukaze ĝi devas esti metita en la buŝon antaŭ ol la fidelulo reirasal sia loko. Krome: ne estas permesata la komunio sur la mano, kiam temas pri komunio laŭ la du eŭkaristiaj akcidencoj pere de trempado. Fine, oni devas zorgi, ke fragmentoj ne falu kaj perdiĝu, ke la manoj estu puraj, kaj ke oni havu decan sintenon".

La indikoj de la historio estis ektuŝitaj jam en la antaŭaj dokumentoj, kaj ili povus esti tiel resumitaj: la antikva uzado permesis al la fideluloj ricevi en la manon la Eŭkaristion, komuniiĝiper si mem kaj ankaŭ porti kun si el la diservo la konsekritan panon, ĉefe por ke ĝi estu viatiko, okaze de persekutado. Ĉiam profunda estis tiam la respekto al la Korpo kaj Sango de la Sinjoro. La uzado de la depono de la hostio sur la lango disvastiĝis nur ekde la 9a jarcento. Dum ok jarcentoj la komunio estis transdonita en la manon kaj tio ne signifis certe malpli grandan respekton.

Ŝajnas nun oportune - aldonas Biffi - ke ankaŭ en Italujo estu petata la permeso por la nova komunia formo:

1) Unue oni konstatas, ke ekster Italujo fariĝas pli komuna la nova maniero, kvankam daŭras ankaŭ la antikva. Des pli, ke okazas ofte, precipe dum kelkaj tempoj, ke eksterlandanoj partoprenas en la eŭkaristia diservo kune kun la italoj. Malpermeso de nia Eklezio pri disdono de la Eŭkaristio en la manon kreas embarasojn.

2) La postuloj, kiuj devigis la aliajn episkoparojn peti la permeson, valoras ankaŭ por la italaj fideluloj: ia ĝeno, almenaŭ por la plej junaj, konformiĝi al la antikva uzado...

3) Sed oni konstatas, fine, ke la nova maniero, eĉ sen permeso, disvastiĝas, kaj ĉe kelkaj parokoj aŭ komuneoj fariĝis kutima. Oni ne povas opinii, ke iam oni trudos revenon al la malnova maniero, kaj ne favoras progreson restadi longe en ĉi tiu frakturo inter fakto kaj rajto. Kun la necesaj garantioj, por ke ne malpliiĝu, eĉ kresku la Eŭkaristia sento, kaj, komprenebIe, permesante la antikvan uzadon, estas dezirinde - konkludas la artikolisto - ke baldaŭ estu permesata ankaŭ en

Italujo la nova maniero, kiu aperas pli kaj pli preferin da ol la malnova: pli simpla, pli persona kaj krom tio, ankaŭ pli higiena.

ORIENTA AFRIKO. TRIOBLIĜIS EN ĈIU PARTO de Afriko la katolikoj dum la lastaj 25 jaroj. Temas pri tiuj 5 afrikaj landoj, kiuj aliĝas al la asembleo de la episkopaj konferencoj AMECEA, tio estas Kenjo, Malavio, Tanzanio, Ugando kaj Zambio. Oni konstatis inter ili kreskon de 290 procentoj. La katolikoj, fakte, pasis de pli ol dek milionoj kaj duono al preskaŭ dek ok milionoj, kun pliigo de preskaŭ sep milionoj kaj duono.

La pli granda kresko okazis en Ugando (kun pliigo de du milionoj kaj 200.000 katolikoj), sekvita de Tanzanio(kun pliigo de pli ol 2 milionoj da katolikoj) kaj de Kenjo (kie en 1949 troviĝis la unika afrika episkopo,dum en la kvin menciitaj landoj ili estas 45).

Pli ol triobligitaj dum ĉi tiuj 25 jaroj estas la indiĝenaj sacerdotoj, kiuj pasis de 280 al 1159. La lando, kiu havis la plej grandan nombron da vokiĝoj estis Tanzanio, kiu dum ĉi tiu tempo havis 453 pliajn sacerdotojn, sekvita de Ugando, kiu ricevis pliigon de 245 sacerdotoj. La pliigo de afrikaj fratinoj en la kvin landoj AMECEA estis de pli ol 3500 unuoj, preskaŭ 250 procentoj.

Ankaŭ ĉi tie la unua loko apartenas al Tanzanio (1726 pliaj indiĝenaj fratinoj kompare al 1949), sekvita de Ugando (779) kaj de Kenjo (631).

Interese estas ankaŭ rimarki la pliiĝon de la misiistaj sacerdotoj, kiu en la kvin landoj atingis 97 procentojn, kun 1200 pliaj sacerdotoj. La unua loko ĉi tie apartenas al Kenjo, kiu hodiaŭ havas 419 sacerdotojn pli ol tiuj de 1949; sekvita de Tanzanio kun pliigo de 242 misiistoj kaj de Zambio, kun pliigo de 211.

BOTSVANIO .- EN ĈI TIU RESPUBLIKO, sude de Rodezio, vivas hodiaŭ 22.000 katolikoj el loĝantaro de ĉirkaŭ 600.000 personoj. La unuaj misiistoj, la pasionistaj irlandanaj patroj, alvenis tien en 1952; de tiam la evangelizado de la loĝantaro daŭris senĉese. La eklezian fortoj nombras 21 irlandajn misiistojn kaj du aŭtoktonajn sacerdotojn, kiuj zorgas pri 15 misiaj stacioj sub gvidado de Mons. Urban Murphy, episkopo de la unika eklezia distrikto de la lando, stariĝinta en 1966: la diocezo de Gaborone. Valora servo estas donita de religiulinoj; aktivas, fakte, en Botsvanio 33 irlandaj fratinoj de la kongregacio "Kruco kaj Pasiono", laborantaj pri du duagradaj lernejoj kaj 9 elementaj kaj pri du katolikaj hospitaloj. Troviĝas ankaŭ tie 12 Ursulaninoj kaj 18 religiulinoj de la loka kongregacio "Fratinoj de la Kalvario", fondita de la sama mons. Murphy en 1967.

ERITREO. - INTERRELIGIAJ CELEBRADOJ. Por veki fratecan spiriton inter samlandanoj kaj ekumenan senton inter kristanoj, en la okcidenta Eritreo oni celebbris kun sukceso plurloke ekumenajn ritojn. En Keren ĉeestis tiucele dudeko da katolikaj sacerdotoj, ortodoksoj kaj religiulinoj venintaj de multaj partoj de la regiono. Patro Luko Milesi, apostola administranto de la latinrita Vikariejo, gvidis procesion, konklude de kiu li alparolis la muzulmanan kaj kristanan loĝantaron, reliefigante la fratan amon inter la filoj de Dio. Post la ceremonio, katolikoj, ortodoksoj kaj muzulmanoj, por konkretigi la kunlaboran celon inter la membroj de la tri religioj, decidis kunigi la unuajn abundajn oferdonojn ricevitajn, por konstrui porakuŝan hospitalon, pri kio sentiĝis urĝa neceso. Poste ili vizitis reciproke preĝejojn kaj moskeojn, kore akceptitaj de la respektivaj responsuloj.

Tiel same en paroko de Aderda, dediĉita al la Savanto, kunvenis en religiaj celebradoj, kun ĉeesto de la Apostola Administranto kaj multaj sacerdotoj, religiulinoj kaj ortodoksoj, granda amaso de la loka loĝantaro, preskaŭ entute muzulmana. La vigla intereso vekita de ĉi tiu celebrado decidigis la responsulojn klopodi por novaj renkontiĝoj ankaŭ por la estonteco.

ETIOPIO. - IMPONA PILGRIMADO honore al la Madono. Preskaŭ 25 mil fideluloj el malsamaj kristanaj konfesioj partoprenis en pilgrimado organizita okaze de la festo de la Dipatrino en Daarit, ĉe Keren, en Etiopio. La manifestado organizita de la cistercaj patroj, kulminis en la liturgia celebrado kaj en la procesio kun la statuo de la Virgulino. Klimato de intensa emocio estis kreita pro la sanktaj kantoj kaj pro la homilio farita de la prioro de la cistercia komunumo de Asmara-Keren, p. Stefano Kidane. Krom per preĝoj kaj kantoj, la pilgrimantoj volis esprimi ankaŭ per la tipaj lokaj dancadoj sian deziron de paco por la etiopa popolo. Fakte, tiu Madono estas titolita Reĝino de la Paco.

KAMERUNO. - ASEKURO PRI MALJUNULECO por eklezioj. Dum ĵusa kunveno la membroj de la Permanenta Konsilio de la Kameruna episkoparo, aliĝis, nome de la nacia episkopa konferenco, al E.M.I. (Asekura organizo por Misioj kaj Institutoj), kies sidejo estas en Lavellois de Francujo. La Permanenta Konsilio decidis krei, ekde 31 dec. 1973, pensian fonduson, enskribante ĉiujn diocezajn sacerdotojn de Kameruno, ĉiujn seminarianojn, pli ol 28jarajn, eventuale ankaŭ la permanentajn diakonojn kun iliaj edzinoj. La jara kotizo, kiun ĉiu membro devas pagi, estas 45.000 frankoj SFA. Sed Instituto de germanaj sacerdotoj, Misio Prim, decidis kontribui memvole donante 500 DM por ĉiu aŭ-

toktona pastro. La resto devos esti pagita de la diocezo. La membroj ĉesos pagi kiam ili fariĝos 60jaraj. La kalkulo de la premiumo diferenciĝas laŭ la aĝo.

KENJO, AFRIKA STATO, teritorie vasta preskaŭ la duoblon de Italujo, naskiĝis je la 12 de decembro 1963 en la stadiono "Ukruru" de Najrobo, kiam je ĉeesto de duko de Edimburgo estis proklamita sendependeco, post 68 jaroj de angla koloniado. Ĝia unua prezidento, Jomo Kenyatta, kiu unue ŝajnis la malplej taŭga persono por pacigo de la lando, ĉar kiel ekstremismo kontraŭeŭropano li estis longtempe enkarcerigita, male, kapablis per sia saĝeco de maljuna afrikano igi Kenjon unu el la plej pacaj landoj de la kontinento.

La maljuna Kenyatta, spite de siaj 82 jaroj, estas ankoraŭ klarvida kaj forta. Filo de patro kikujua, la raso plej nombra en Kenjo (2.200.000 personoj), li estis edukita en protestanta lernejo, doktoriĝis pri antropologio en Londono kaj loĝis tri jarojn en Moskvo. Patro de la nova Kenjo, li estas unu el la ĉefaj figuroj de la afrika naciismo.

Multaj tamen demandas al si, kio okazos post la morto de la maljuna gvidanto, kies politiko realisma kaj paca, subtenata de lia forta personeco, sukcesis ĝis nun superi ĉiujn opoziciantojn. Tom Mboya, la probabla posteulo de Kenyatta, estis mistere mortigita en 1969.

La tribaj luktadoj, precipe inter la Kikujuoj kaj la Luoj ankoraŭ ne estingiĝis. La loĝantaro de Kenjo estas dividita laŭ pli ol 40 triboj, kaj ĉiu el ili havas propran lingvon. La du oficialaj lingvoj estas la angla kaj la kisvila, sed la nacia radio transsendas per 19 lingvoj!

Laŭ la lastaj statistikoj la katolikoj havis notindan pliigon. El loĝantaro de 12 milionoj kaj duono da personoj,

ili atingis preskaŭ du milionojn (1.979.849) kun kresko de 700.000 unuoj dum la lastaj ses jaroj. Bedaŭrinde ankoraŭ ne tro sufiĉa la nombro de la aŭtoktonaj sacerdotoj (nur 93, kun pliigo de 25 kompare kun 1967), dum la misiista klerikaro kreskis de 550 al 646 unuoj dum la sama periodo.

Nun la meznombro estas 1 sacerdoto por 2679 katolikoj kaj 1 por 14.241 ne katolikoj. Granda parto de la episkopoj de la 13 eklezioj distriktoj en Kenjo estas eŭropanoj. Sed notinda kresko estiĝis inter la lokaj religiulinoj. Dum 6 jaroj ili kreskis laŭ triono, kaj tiel nun ili estas 757, dum la eksterlandaj estas 785. La samo okazis pri la aŭtoktonaj religiaj fratoj: 113 kontraŭ 111 eksterlandaj.
La espero de la Eklezio kuŝas sur la 163 pli aĝaj seminarianoj de la teologiaj kursoj, kiuj duobliĝis kompare kun la 1967. Pasintjare Kenjo havis sian unuan kardinalon en la persono de la ĉefepiskopo de Najrobi, Maŭrico Otunga, 51 jara, filo de granda afrika ĉefo.

Rimarkindaj estas la klopodoj de la Eklezio en la socia kampo. La elementaj lernejoj instruas 350.000 lernantojn, la mezgradaj 32.000, la teknikaj 3.200, la instruistaj 3.600. Lernejoj, hospitaloj, seminarioj kaj aliaj entreprenoj por la homa progreso estas en Kenjo inter la plej nombraj el la tuta Afriko.

Prezidento Kenyatta ripetfoje laŭdis la kontribuaĵon de la misiistoj al progreso de Kenjo. Antaŭ nelonge, okaze de inaŭguro de la katolika hospitalo de Najrobi, gvidata de la Misiaj Fratinoj de la Konsolitino, li diris: "Ĉiuj povas konstati kiom veras, ke krom la laboron por la animoj, la misiistoj celas ankaŭ la sanigon de la korpoj. La hospitaloj de la misioj estas hodiaŭ la plej bela heredaĵo de la kolonia periodo... La misiaj fratinoj, a-

parte estas tiuj, kiuj pli ol ĉiuj zorgas por ĉi tiu servado, rezignante pri ĉiuj komfortoj kaj plezuroj de la vivo... Ni lernu ami nin reciproke, kiel la misiistoj havas amon inter si kaj al siaj fratoj". Poste, sin turnante al la misiistoj, Kenyatta konkludis: "Kiel prezidento de Kenja mi invitas vin daŭrigi vian laboron inter ni sen timo. Ni helpos vin ĝis ebleco, kun la espero, ke la popolo, inter kiu vi laboras, lernu pli kaj pli, kiel ni devas reciproke ami nin".

Sed estas devo por ni memori ankaŭ pri la meritoj de la kristanaj konfesioj de la lando. Ĉiuj kune ili nombras preskaŭ 900.000 sekvantojn. Notinda estas ilia kontribuaĵo al la homa progreso, precipe en la eduka sfero.

La muzulmana komunumo estas ok procentoj de la loĝantaro de Kenjo, dum la araboj, preskaŭ ĉiuj komercistoj, estas 35.000. La 140.000 azianoj, kiuj vivas en ĉi tiu lando, estas preskaŭ ĉiuj hinduoj aŭ muzulmanoj. La restantaj eŭropanoj estas 45.000. Inter la katolika Eklezio kaj la protestantaj ekzistas iniciatoj pri ekumena kunlaborado, precipe pri sociaj komunikiloj.

Oni agnoskas, ke en la sinsekvaj fazoj de la evangelizado kaj en la formado de la kristana komunumo, kiel ankaŭ en la ekumena itinero, oni estas ankoraŭ ĉe la unuaj paŝoj, versajne la plej malcertaj kaj lacigaj; sed la semo de tiom da oferoj disdonitaj senmezure de la misiistoj dum la okdekjara laboro sub la influo de la Sankta Spirito, ne povos resti sterila.

KENJO. - GVIDILO DE LA EKLEZIOJ. Aperis en Najrobo, en la angla lingvo, interesa "Gvidilo de la Eklezioj de Kenjo" (Kenya Churches Handbook). La verko prezentas en 300 paĝoj vastan tutrigardon pri ĉiuj konfesiaj Eklezioj agantaj en la lando, kaj ĝi estas frukto de la ekumena kunlaboro inter ili. La volumo estas pro

vizita per multaj statistikoj, kiuj montras la vitalecon de la konfesioj.

Al preciza informado la libro aldonas rimarkindajn ilustraĵojn, kiuj igas ĝin eĉ pli ŝatinda. Interalie ĝi entenas fidelan kronikon pri la evoluoj en Kenjo de la kristanaj konfesioj, de islamismo kaj hinduismo.

LESOTO. - (SUDA AFRIKO). Preskaŭ mil (ekzakte 989) estas la katekistoj. El ili 41 laboras plentempe, 611 dum parto de sia tempo, 337 nur laŭokaze. Por ilia formado ekzistas du centroj en la lando: unu dediĉita al sankta Karlo Lwanga, en Mafeteng, kiu organizas dujaran kurson por la katekistoj de la diocezoj de Maseru, Leribe kaj Bloemfontein, sub direkto de p. Philippe Dubois; kaj la alia, dediĉita al sankta Francisko, por trijaraj kursoj, ĉe Qach's Nek, gvidataj de p. Raimondo Fortier.

MALAVIO. - KRISTANA KUNLABORO. Okaze de la 10a datreveno de sendependeco de Malavio, la Katolika Eklezio kaj la Presbiteriana de la afrika respubliko publikigis kunan mesaĝon, por esprimi dankon al Dio kaj kunsenton kun la civilaj aŭtoritatoj. La dokumento, subskribita de la prezidanto de la episkopa konferenco de Malavio, ĉefepiskopo James Chiona, substrekas la rimarkindan ekonomian progreson de la lando kune kun la klimato de religia libereco, kiuj karakterizis ĉi tiujn dek jarojn, kaj kiuj konsistigas la premison de eĉ pli bona estonteco:

"La reprezentantoj de la du Eklezioj omaĝas al la Prezidento de Malavio, Ngwazi Kamuzu Banda, kaj esprimas esperon, ke la kristanoj povos daŭrigi kunlaboron por konstruo de la lando kun fido, karitato kaj komprenemo. Ĉi tiu sento - akcentas la dokumento - estas ne-

pre necesa por la pluvivo de la lando, en kiu ĉiuj kapablu labori, kaj kie la respekto al la homa persono devas esti agnoskata kiel fundamento de demokrateco: justeco en la religia, politika, socia kaj ekonomia bazo, devas esti garantiata al ĉiuj civitanoj".

NGVANIO. - EN ĈI TIU MALGRANDA afrika ŝtato, iama Svazio, situanta inter la Sudafrika Respubliko kaj Mozambiko, la entreprenoj de la katolikaj misiistoj estas inter la plej fekundaj kaj ŝatataj de la loka loĝantaro kaj de la registaro. La katolikoj, kvankam ili estas minoritato: 38.000 sur totalo de 400.000 loĝantoj, disigitaj tra lando de 17 mil kv. km., aktive laboras por la socia, saniga kaj religia asisto de la loĝantaro.

Sub gvidado de mons. Casalini, episk. de Manzini, la misiistoj: 31 eksterlandaj kaj 3 indiĝenaj,-al kiuj aldoniĝas 128 fratinoj kaj 41 kunlaborantaj fratoj - malfermis en Ngvanio hospitalon, direktatan de itala fratino kaj ekzercejon kun profesiaj kursoj por adoltoj psike handikapataj, direktatan de itala sacerdoto.

Krome, pro malfacilaĵoj de trafikvojoj, oni organizis moveblan servon por saniga helpo, kiu daŭre vizitas ĉiujn vilaĝojn.

Fine, la duagradaj katolikaj lernejoj gvidataj de la misiistoj, sed agnoskitaj de la Ŝtato, estas frekventataj de multaj lernantoj, sendistinge de religio.

SUDAFRIKO. - CENTRO POR TEOLOGIA formado. La katolika porpastra seminario Sankta Petro en Hammanskraal - Sudafriko -, malfermis en siaj lokaloj centron por teologia formado de pastoroj apartenantaj al la sendependaj Eklezioj de kristanaj negroj. La centro, kiu ekfunkciis komence de julio, volas esti atesto de solidareco de la katolikoj kun la loĝantaro. Krome, de la

sudafrika regiono Natalo ni ricevas informon, ke la loka Konsilantaro de la Eklezio elektis je la unua fojo haŭtkoloran prezidanton, resp. Lambert Poodhan, el la anglikana Eklezio, dum la ofico de vic-prezidanto estis transdonita, ankaŭ ĉikaze je la unua fojo, al katoliko, p. George Purvis.

UGANDO. - ASOCIO DE GEPATROJ por edukado de knaboj. Funkcias vigle en la ĉefdiocezo de Kampalo - Ugando -, gepatra asocio, kiu celas vigligi la kristanan edukadon de la knaboj en la teritorio de sia zono. La asocio aktivas ĉefe per financado de lernejoj kaj privataj parokaj institutoj, kaj per pretigado de bonaj instruantoj pri religio por elementaj lernejoj. La membroj de la asocio klopodas ankaŭ interesigi al la iniciato ne nur ĉiujn familiojn de Kampalo, sed ankaŭ de la tuta lando.

ZAMBIO. - REORGANIZADO DE SEMINARIOJ. Ĝis aprilo de 1973 la pli aĝaj seminarianoj de Zambio studis en la porpastra regiona seminario de Kachebere (diocezo de Lilongwe) en Malavio; sed pro kontraŭstaroj kun la registaro de tiu lando, la zambiaj seminarianoj devis forlasi Kachebere dum la Pasko de la ĵus pasinta jaro.

La 28 junuloj daŭrigis siajn studojn je la deka de aŭgusto en provizoraj lokaloj de la minora seminario de Mpima, kelkajn kilometrojn norde de Kabwe, en la ĉefdiocezo de Lusaka. Sed la episkopoj de Zambio decidis, ke ekde januaro 1974 la minoraj seminarianoj iros al Choma kaj ke Mpima fariĝos la nacia supera seminario. Je la 20 de januaro komenciĝis la lerneja jaro 1974 kun 43 pli aĝaj seminarianoj (28 filozofiaj studentoj kaj 15 teologiaj) kiuj devenas de la diocezoj de Lusaka, Chipata,

Livingstone, Monze, Ndola, Kasama, Mansa, Mbala kaj Solwezi. Dum la fino de la semajno tiuj seminarianoj helpas en parokoj, instruante katekismon, organizante la junulojn en apostola agado, kaj vizitante malsanulojn kaj enkarcerigitojn.

De nun Choma havos la minoran seminarion por Lusaka, Monze, Livingstone, Chipata kaj Solwezi; alia en Lubiski estos por Kasama kaj Mbala; la aliaj diocezoj havos propran seminarion.

AMERIKO. - EN BRAZILO ESTIS organizita konkuro pri verkado de liturgia himno, por la naŭa eŭkaristiana ĉia kongreso, okazonta en Manaus de la 16a ĝis 20a de julio 1975.

La kondiĉoj por la partopreno en la konkuro estis dissenditaj per pli ol cent radistacioj kaj publikigitaj de multaj ĵurnaloj kaj periodaĵoj de la lando. Temo de la himno devas esti: "Dispecigo de la pano". La konkurantoj devas sendi siajn verkojn antaŭ la 15a de junio al la ĝenerala sekretariato de la episkopa brazila konferenco. La konkurvenkinto gajnos senpagan vojaĝon kaj loĝadon en Manaus dum la eŭkaristia kongreso.

BOLIVIO. - "FE Y ALEGRIA" (kredo kaj ĝojo) estas iniciato enkondukata de la Jezuitaj Patroj en la tuta latina Ameriko. La projekto, kiu celas progresigon de la instruado, estas fortike bazita en ok el la naŭ Boliviaj departementoj, kun 106 lernejoj kaj ĉirkaŭ 34.000 lernantoj, nome 3,2 procentoj de la tuta lernantaro. La iniciato ampleksas la tutan formadan sektoron, de vartejoj al specialigaj kursoj.

Multaj ankaŭ estas la katekistaj centroj, bibliotekoj kaj dispensarioj. Kunlaboras en la programo 151 religiuloj, apartenantaj al 41 malsamaj kongregacioj kaj pli ol

1.300 laikoj.

Valora helpo estas donata de la loĝantaro mem, de la lokaj aŭtoritatoj kaj de internaciaj porkaritataj asocioj.

KANADO. - LEĜPROJEKTO POR DEFENDO de flegistinoj, kiuj pro sia konscienco rifuzas partopreni en kelkaj kirurgiaj intervenoj kaj en abortigaj procedoj, estos proponata en la parlamento de la kanada provinco de Ontario, fare de deputito Norm Cafic.

La parlamentano antaŭanoncis ankaŭ, ke tiu projekto ebligos oportunajn sankciojn kontraŭ kuracejoj, kiuj klopodus puni tiujn rifuzantojn. Li deklaris, ke estas pristudataj iniciatoj cele al abortredukta leĝaro. Li menciis kazojn, en kiuj fakte, kelkaj flegistinoj, kiuj pro siaj religiaj konvinkiĝoj rifuzis kunlaboron, estis forpelitaj de hospitalaj administracioj.

USONO. - SEVERA REALVOKO al respondeco pri la sociaj komunikiloj por la morala leviĝo de la konscienco, estis ĵus farita de la ĉefepisk. de Los-Anĝeleso, en Usono, kard. Timothy Manning.

Parolante en la Amerika Konsilio por la publikaj rilatoj pri religia kampo, la purpurulo kondamnis la trouzon, kiu per amas-komunikiloj estas farata cele al diskonigo de brutaleco, perforto, eroto. Li insiste invitis la kredantajn publicistojn reliefigi ĉiujn manifestiĝojn pri boneco, je kio la nuntempa mondo estas ankoraŭ riĉa, kvankam ĝi ne altiras scivolemon. Li akuzis ankaŭ ĵurnalojn, kinon, teatron kaj televidon pro ia cinikisma modo, kutime tio, kio estas pli malbona en la socio; kaj repostulis por la Eklezio la rajton indiki moralajn kaj spiritajn valorojn ankaŭ per ĉi tiuj interkonaj komunikiloj.

Kard. Manning fine aŭspiciis pli intensan kunlaboron inter amas-komunikiloj kaj religiaj komunumoj, kaj proponis al ĵurnaloj rifuzi publikigon de malmoralaj filmoj kaj spektakloj.

EN ĈIU ĈAMBRO DE MOTELOJ en Usono kaj Kanado baldaŭ troviĝos ekzemplero de "Nova Testamento". La Ligo por la tutmonda disvastigo de la Biblio (World Home Bible League) kalkulas plenumi ĉi tiun iniciaton dum ĉi tiu jaro.

La programo jam efektiviĝis en 32 nordamerikaj ŝtatoj kaj en 3 Kanadaj provincoj. P. John De Vries, direktoro de la Ligo en South Holland, Ilinojso, deklaris ke ekzempleroj de "Reach Out" (titolo de la nov-testamenta eldono) estas jam metitaj en 200.000 motelaj ĉambroj. En ĉiu ekzemplero troviĝas invito, ke la leganto kunprenu la libron kaj kontaktiĝu kun la Eklezio, kiu zorgis pri tiu iniciato, por ke ĝi helpu lin en la studado de la Sankta Skribo. Dum nur unu monato de la pasinta somero pli ol 100.000 personoj akceptis la omaĝon.

LA DANĜERO DE L' EŬTANAZIO. "Eŭtanazio, proponata de kelkaj kiel rajto, povus fariĝi devigo por ĉiuj". Ĉi tiu admono aperis en direktora artikolo de la amerika revuo "Columbia", publikigita en New Haven de Connecticut zorge de la Kavaliroj de Kolumbo. Kiel estas konate, eŭtanazio signifas morton trankvilan kaj rapidan, donitan per taŭgaj rimedoj, precipe pere de narkotikoj, al personoj trafitaj de ne resanigeblaj malsanoj, por malpliigi iliajn suferojn. Kiel same estas konate, eŭtanazio estas tute ne akceptebla laŭ la kristana moralo; fakte ĝi kontraŭas al la malpermeso hommortigi, ĉar nur Dio estas absoluta estro de la vivo.

"Necesas memorigi - admonas la revuo de la Kavaliroj

de Kolumbo -, ke se la socio ekiras laŭ la glitiga vojo de la selektita ekstermo, ĝi neeviteble revenos al la gaskamero de la Hitlera Germanujo".

La direktora artikolo aldonas, ke la klopodoj legalizi la tiel diritan "morto kun digno", devenas de la samaj tendencoj, kiuj decidigis la Plej Altan Kortumon de Usono konsenti pri la Heroda amasbuĉo de naskiĝontoj, en nomo de libereco. La sama revuo, polemikante kun freŝdata memorando pri tiu temo, publikigita de ĵurnalo "The Humanist", memorigas, ke homo estas nur administranto de sia vivo, kaj ne ĝia absoluta estro, kaj pro tio ne estas permesate al li arbitre ĝin ĉesigi.

RELIGIULINO ELEKTITA FAKULTATESTRINO de Universitato. - Temas pri fratino Henrika Hennessey, el la Kongregacio de "Cenacolo", kiu estis elektita direktorino de la Teologia Bostona Instituto, kiu kunigas 8 fakultatojn pri teologio katolika kaj protestanta. Fratino Hennessey doktoriĝis pri psikologio kaj religia pedagogio ĉe Universitato Fordham.

KANSAS CITY: LA UNUA TUTECA PAROKO. Unujara estas originala paroko de Kansas City (Usono), verŝajne unika en sia speco, kaj nomata "tuteca paroko". Temas pri kolektivo de 11 malgrandaj parokoj, kiuj estas servataj de ekipo de tri kapucenoj kaj du benediktanaj fratinoj. La koncepto de "tuteca paroko" devenas de la fakto, ke ĝi estas organizita tiel, ke ĉiuj fideluloj partoprenas en ĝi laŭ grupoj de 20-25 familioj.

Dufoje monate ĉiu grupo kunvenas, kutime, ĉe la hejmoj. Ofte oni diskutas la eventojn laŭ vivekzameno. La sacerdotoj ĉeestas laŭ ebleco, por celebri la hejman eŭkaristion. Sed se la sacerdoto ne povas interveni, la grupoj tamen funkcias egalmaniere pri legado de la dia

vorto kaj religia instruado.

PREMIO AL LA KATOLIKA historiisto mons. Ellis.La premio, kiun la Universitato de San-Francisko liveras ĉiujare al iu, kiu distingiĝis en la instruado, estis asi gnita ĉijare al la katolika historiisto Mons. John Tracy Ellis, pro liaj zorgoj en la disvastigo de la vero. La motivado de la premio substrekas la rolon de proparolanto por la amerikaj katolikaj intelektuloj, kiun trans prenis mons. Ellis, kiu en siaj libroj "priskribis kaj admirinde disvolvis la ĝeneralajn karakterojn de la ka tolikismo en Usono, larĝe kontribuante al la priserĉado de la vero".

Mons. Ellis estas difinita kiel "kuraĝa defendanto de la intelekta libereco" kaj inspiranto de la nova generacio de la katolikaj pensuloj en la tuta lando.

Aŭtoro de 16 volumoj pri historio kaj universitata profesoro, li estas nun dekano de la amerika katolika historia societo. La nacia konferenco de la katolikaj epis kopoj elektis lin antaŭ nelonge membro de la komitato por la celebradoj, okaze de la dua jarcento de la usona sendependeco.

ALASKO (USONO). - MONS. ROBERT WHELAN, epi skopo de Fairbanks, decidis starigon de seminario por dioceza klerikaro. Tiu projekto jam estis proponita de la lokaj jezuitoj. La seminario, kiu estos konstruata apud la Universitato de Alasko, estos la unua en ĉi tiu ŝtato.

Mons. Whelan deklaris, ke la iniciato okazigos vojturniĝon en la vivo de la Alaska Eklezio, precipe ĉar ĝi e bligos, ke la aspirantoj al sacerdoteco ne estos deviga taj plenumi siajn studadojn ĉe sociaj kaj kulturaj medioj malsamajde iliaj vivkondiĉoj. La tasko de rektoro jam

estis komisiita al jezuito p. Charles Peterson, kiu okupiĝas ankaŭ pri la dioceza programo por la permanenta diakoneco.

AŬSTRALIO. - FINANCADO DE KATOLIKAJ lernejoj. Plaĉan konsenton oni esprimis en la katolikaj medioj de Sidnejo por la registara decido doni ŝtatajn helpojn al la katolikaj lernejoj. Unu el la postulataj kondiĉoj por la financado, estas ke la lernejoj interesitaj rezignu pri la religia antaŭekzameno de la lernantoj. Ĉefep. James Carrol, helpep. de Sidnejo kaj prezidanto de la komitato por la katolika instruado, deklaris, ke la registara decido estis unu el la plej signifaj eventoj en la historio de la katolikaj lernejoj en Aŭstralio.

EN PAPULANDO - NOVGVINEO - la katolikoj estas preskaŭ 600.000 el loĝantaro de du milionoj kaj duono da indiĝenoj, kies duono estas kristanoj. La katolika Eklezio gvidas en la lando trionon de la 2500 ekzistantaj lernejoj. La aŭtoktonaj sacerdotoj estas trideko, kaj naŭdek la teologiaj studentoj en la supera seminario de Port Moresby, ĉefurbo de la lando. La minoraj seminarioj havas 200 seminarianojn. 200 ankaŭ estas la aŭtoktonaj fratinoj kaj 25 la kunlaborantaj fratoj.

Nur unu el la 17 episkopoj de Papulando -Novgvineo estas indiĝena: mons. Vangeke, konsekrita de Paŭlo 6a mem okaze de lia vizito en Aŭstralio, decembre de 1970.

La ekumena spirito estas tre vigla en la lando. Ĉiuj ĉefaj religiaj grupoj partoprenas en la Konsilio de la Eklezioj de Melanezio. Krome, katolikoj, luteranoj, anglikanoj kaj anoj de la Unuiĝinta Eklezio interŝanĝas reciproke siajn preĝejojn por renkontiĝoj, retiriĝoj kaj formadaj kursoj.

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

| | |
|---|---|
| *Quota di abbonamento L.* | **1500** |
| *Abonkotizo* *italliroj* | **1500** |

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE